VENEN (f)
—a 10.1 (muŝo).
VENT (f)
—o 1.6; 5.16; 8.8; 11.4.
—a 1.14 (aranĝoj), 17; 2.11 (entrepreno).
aĵo 2.17; 4.4.
VER (f)
—o 3.16; 12.10.
VERK (f)
—i 12.12 (librojn).
VESPER (f)
—e 11.6.
VID (f)
—i 1.10; 2.13, 21; 3.10; 4.4; 9.11; 11.7.
—ado 1.8.
ek—i 2.3.
sen—iĝi 12.3 (rigardantoj).
VIN (f)
—o 2.3; 9.7.
—berejo 2.4.
VIR (f)
—o 7.28.
—ino 7.26.
VIRT (f)
—a 7.16 (esti —).
—eco 7.15.
—emo 7.29.
—ulo 7.15.
mal—i 7.17.
mal—eco 7.15; 8.8.
mal—ulo 7.15; 8.10.
VIV (f)
—o 2.3, 17; 3.12; 5.18; 8.15.
—i 6.6; 11.8.
—a 6.8 (estaĵo).
—ulo 9.4.
VIZAĜ (f)
—o 7.3; 8.1.
VOĈ (f)
—o 10.20.
VOJ (f)
—o 10.3, 15 (al la urbo); 11.5 (iri —on); 12.5.
VOL (f)
—i 12.12.
VORT (f)
—o 1.1; 5.2; 7.21; 12.10.
VUND (f)
—i 10.9 (sin).
ZORG (f)
—o 2.22.
—emeco 2.26.

**Listo de la prepozicioj**

al, antaŭ, ĉe, ĉirkaŭ, da de, el, en, ĝis, for, inter, je, kontraŭ, krom kun, per, por, post, pri, sen, sub, super, tra, trans.

**Aliaj elementoj (krom afiksoj)**

ankaŭ, ankoraŭ, ambaŭ, ajn, aŭ, bal daŭ, cent, ĉar, ĉi, ĉia, ĉiam, ĉio, ĉiu, ĉu, dek, des, do, du, dum, eĉ, ĝi, ili, iu, jam, jen, ju, kaj, ke, kia, kiam, kie, kiel, kio, kiom, kiu, kvankam, kvazaŭ, li, mem, mi, mil, ne, nek, nenia, neniam, nenio, neniu, nun, ok, ol, oni, plej, pli, se, sed, si, ŝi, tamen, tia, tie, tiel, tio, tiu, tri tro, unu, vi.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

415.5.001.3

## MORFOLOGIA KLASIFO DE VORTOJ

**(F. G. Blazquez, Caracas, Venecuelo)**

En Morfologio, la parto de la Gramatiko kiu studas vortojn kaj ties akcidentojn, estas miksitaj du sistemoj por klasifi vortojn: iu el ili estas klasifi laŭ la signifo, kiel bone motras la lerneja difino de substantivo: „vorto kiu signifas personon, beston aŭ aĵon". Ekzemplo de la alia kriterio — klasifi vortojn laŭ la sintaksa funkcio — estas la sekvanta difino de adverbo: „vorto kiu modifas verbon".

Ĉi tie ni ne estas ripetontaj la kritikojn faritajn far sennombraj gramatikistoj laŭlonge de jacentoj al la unue citita sistemo, sed simple rimarkontaj la bezonon de vere racia klasifo kaj eĉ subklasifo de la vortoj el la morfologia vidpunkto.

Pravigoj kiuj justigas tiun intencon fari alian klasifon estas kelkaj eraroj en la difinoj de vortklasoj, misklasifoj de opaj vortoj kaj ankaŭ vortoj kiuj ne ĉiam havas klasifojn en diversaj lingvoj, kiel ekvivalentoj de la jenaj esperantaj vortoj: ĉu — nur —ĉi — ajn— plus — ol kaj jen.

### Fiksado de la kriterio por la klasifo

En ĉi tiu artikolserio mi faros klasifon sur ekskluziva bazo de la sintaksa funkcio de vorto ĉe la parolo, kun ideo ne lasi vortojn sen loko en la klasifo. Do, por trafi idealan klasifon de vortoj, al ĉiu vortspeco

devas respondi unu sintaksa funkcio, t.e fako en la diagramo (vidu „La Strukturo de la Oracio" Scienca Revuo Vol 19 No 1 (73)) kaj reciproke al ĉiu sintaksa funkcio, unu vortspeco.

### Vortspecoj en la simpla oracio

Ni komencos per vortoj entenitaj en simpla oracio, pri kiuj ni parolos iom pli detale.

La plej perfekta koincido okazas ĉe oracia kerno, la **verbo.** Tiu koincido plenumiĝas ĉiuokaze: tio kio estas verbo ĉe la klasika skemo, estas tio, ĉi tie, kaj reciproke.

Alvenante al la **substantivo,** ni ne havas jam tiun reciprokan respondecon, ĉar la klasika subtantivo plenumas pli ol unu sintaksan funkcion. Sen pritrakti aliajn detalojn, unu el ĉi tiuj funkcioj estas tiu de antaŭverbo kaj la alia la postverba.

La **pronomo** devas konsideriĝi kiel speco de substantivo, tial ke ĝi povas ekzerci ĉiujn ties funkciojn. Oni devas klarigi ĉi tie, konvenus elimini elnomaĵojn kiel »adjektivaj pronomoj«, »adverbaj pronomoj«, »pronomoj adverbaj« k.a. tial ke per ili oni emas konfuzi konceptojn nete diferencigendajn.

Ĉar »pronomo« laŭ sia etimologio signifas »anstataŭ nomo«, ni uzos la terminon »nomo« en pli logika maniero t.e. anstataŭ la klasika substantivo. Alivorte, la speco substantivo subdividiĝas en nomo kaj pronomo.

La kategorio komplemento de substantivo, ĉu antaŭverba, ĉu postverba respondas preskaŭ ekzakte al la klasika **adjektivo.** Necesas tamen klarigi ke oni devus forĵeti la nomiĝon »adjektiva nomo« (paralele al tiu de »substantiva nomo«) tre komuna ĉe la latina gramatiko, kaj tiuj de certaj latinemaj gramatikistoj; ĉar laŭ tio supre eksponita, adjektivo kaj substantivo ekskluzas unu la alian, malgraŭ ŝajna simileco de funkcioj observitaj en iuj kazoj. Rilate al la sinoptika tabelo, ĉefine montrita, utilas klarigi ke la adjektivo inkluzas la **artikolon** kaj la **numeralon.**

Alia nekonvenaĵo eliminita en nia skemo estas la malĝusta lokigo de la adjektivo. Efektive, ĉe la klasika skemo tiu vortspeco povas agi kiel postverbo, kontraŭstare al sia esenco, kiu altrudas al ĝi ian subordigon al la substantivo.

En la fakon respondan al la verba suplemento ni situigas, kiel oni vidis en la lasta artikolo, la **adverbon.** Sed, se ni volas konstati la reciprokecon ni notos ke ekzistas iuj klasikaj adverboj ne decantaj al ĉi tiu kadreto.



### Vortspecoj ekster la skemo

Efektive, adverboj kiel »tre«, »tro«, »preskaŭ« k.a. funkcias ofte kiel modifiloj de adjektivoj, kaj se oni limigas la funkcion de la adverbo je modifi nur verbojn, oni nepre konkludos ke tiuj adverboj ne devas havi lokon ĉe iu fako de la skemo. (Ĉi tiu realĝustigo de la difino de adverbo, evidente bezonus gravan klarigon kiu meritus apartan kaj longan artikolon). Ili estas nomataj de iuj gramatikistoj **adverboj de gradoj,** kaj en la nuna klasifo oni povas nomi ilin **gadigiloj.** Ili ne estas esencaj vortspecoj, ĉar ilia funkcio povas esti plenumata de afiksoj, t.e. vorteroj. Ekz. hispane :muy bella = tre bela; bellísima = belega.

Per la antaŭo ni finis klarigi respondecon inter fakoj kaj vortspecoj, sed ekzistas aliaj specoj kaj subspecoj de vortoj kiuj ne havas lokon en la skemo. Ni vidu:

Ia vortspecoj kiuj mankas en nia skemo estas la interjekcio, la prepozicio kaj la konjukcio, kiujn ni analizos en ĉi-sama ordo.

La **interjekcio** havanta valoron de elkria oracio, ne povas esti parto de nenia oracio; tial, ĝi ne estas enmetita en nian skemon.

Pri la **prepozicio,** ni scias ke ĝi ne estas propre vorto, ĉi tio estas tiel certa ke enprimitivaj idiomoj ĝi estas nur parto de vorto (estas lokigata ĉe la fino de la vorto, post radiko aŭ radikalo, kaj tial nomiĝas **postpozicio).** En modernaj lingvoj kaŭze de la bezono reprezenti diversajn nauncojn, ĉi tiu partikulo estas disiĝinta de la vorto — ĝenerale substantivo — aperante kiel oracia elemento, almenaŭ grafike sendependa.

### Konektiloj

La **konjunkcio** ne eniras nian skemon, ĉar simple tiu estas vorto kiu funkcias ligante oraciojn; ĝi troviĝas do, ekster oracio, sed interne de la periodo kunmetita. Ni devas apartigi el la klasika koncepto de konjunkcio, la subordigajn konjukciojn, ĉar la pseŭdoprefikso **kon** elvokas ideon de samvaloraj elementoj ligitaj. Tuj malsupre ni vidos kien ni resituigos ĉi tiujn subspecojn.

Rilate al subspecaj vortoj, ni havas **rilatajn pronomojn kaj adverbojn,** kiuj ne apartenas al tiu simpla oracio, ĉar ili ligas subrodigitajn oraciojn en kompleksan oracion. Ĉi tiuj vortoj kune kun la subordigantaj konjunkcioj, posedas funkcion konekti suboraciojn; ili estas do, subordigaj konektiloj, tiuj vortoj kiujn Plena Gramatiko nomas **subjunkcioj.**

### Konkludoj kaj resumo

Ĉi tio estas je grandaj trajtoj apliko de la proponita skemo al la morfologia klasifo de vortoj. Kiel ĝenerala averto por la realĝustigo de ĉi tiu klasifo, estas atentenda ke oni devas ne konfuzi formon kun funkcio, ekz.: la vorto »kiam« povas esti aŭ demanda adverbo (**Kiam** vi alvenos?) aŭ subjunkcio (Mi alvenos **kiam** la suno malleviĝos); analoge »multe« povas esti gradigilo (Tiu domo estas **multe** kosta) aŭ adverbo (Li **multe** babilis dum la festo), K.t.p.

Konsiderante kiel lingvajn elementojn: oracion simplan, oracion kompleksan kaj periodon kunmetitan, ni povas situigi la vortspecojn kiel montras la sekvanta sinoptika tabelo.

SINOPTIKA TABELO PRI VORTSPECOJ

- Egalvaloranta oracion — Interjekcio
- Neegalvalorantaj Oracion
  - Integrantaj Oracion . .
    - . . . Simplan
      - esencaj (1): verbo, substantivo, adjektivo, adverbo
      - akcesoraj: prepozicio, gradigilo, . . . aliaj (2)
    - . . . Kompleksan (3) — subjunkcio
  - Ne Integranta Oracion (4) — konjunkcio

**Notoj al la Tabelo**

(1) Koincidas kun elementoj de la skemo de oracio.
(2) Varias laŭ diversaj lingvoj.
(3) Kompreneble vortspecoj de la krampo » . . . Simplan« povas integri kompleksan oracion.
(4) Sed integras kunmetitan periodon, kaj kompreneble tiuj vortoj kiuj integras oracion ankaŭ integras periodon.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

341.18 : 378.4 : 408.92

## PROBLEMO PRI INTERNACIA LINGVO

### en la internacia seminario ,Universitato hodiaŭ'

**(Bož. Popović, Beograd, Jugoslavio)**

Internaciaj ĉiujaraj seminarioj nomitaj „Universitato hodiaŭ" pritraktas diversajn aktualajn problemojn komunajn al ĉiuj (aŭ almenaŭ al pluraj) universitatoj. Ili okazas en la turisma urbo **Dubrovnik** (Jugoslavio) kaj la lasta — la 13-a — estis de la 1. ĝis la 10. de septembro 1968. La pritraktita temaro ariĝis ĉirkaŭ du ĉefaj titoloj „Universitato kaj kulturo" kaj „Problemoj pri universitate edukataj specialistoj en la evoluantaj landoj".

Kvankam la temaro ne koncernis rekte la problemojn de la internacia lingvo, ili estis tamen tuŝitaj en du artikoloj kaj en la diskutado pri la unua temaro. Unue Prof. **Hamming** (Alta Agrikultura Lernejo, Wageningen, Nederlando) favore menciis Esperanton en la „Enkonduko kaj resumo" de sia presita referato, ankaŭ dum ĝia prezento antaŭ la partoprenintoj de la seminario. Unu alia referato (Prof. **H. F. Peters** Portland State College, Usono) koncernis rekte la problemon pri internacia lingvo, ĉar ĝia titolo estis „La rolo de lingvo en la demando pri paco«. En lia referato (presita antaŭ la okazigo de la seminario en la aparta numero de la gazeto »Universitato hodiaŭ«) la ĉefaj pensoj estis: 1) la pacperiodoj de la homaro estis samtempe la periodoj kun unu komuna lingvo, 2) la nuna mondo postulas kreon de